



**Esperanto
Societo
Frankfurto**

aprilo 2015

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

ESPERANTO INFORMILO

Esperanto-
Gesellschaft
Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzender:
Martin Schmitt
Giessener Str. 18
35415 Pohlheim
Telefona: abends
49 -171-7412414
E-Mail
esperanto@scsy.de

Bankverbindung:
Esperanto-Gesell-
schaft Frankfurt /M.
IBAN: DE75 5008 0000
0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
Commerzbank
Frankfurt/M.

Beitrag:
mit DEB-Beitrag 80
€ Familienmitglied
40 €
Nur ESF: 20 €
Familienmitglied
10 €

NOVA ESTRARO



foto: uf

ni plijuniĝas

Antaŭa vico de maldekstre: Hildegard Stecay, d-rino Anina Stecay, vicprezidantino, Katarina Eckstädt, dipl.ing. Georg Hennemann.
Malantaŭa vico: Martin Schmitt, prezidanto, Walter Ullmann, d-ro Klaus Rumrich, protokolanto kaj Reinhard Pflüger, kasisto.

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d. 2.4.2015

ĵaŭdon, la 2an de apr. 2015

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, den **2. 4. 2015** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj
interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **2an de aprilo 2015**.

18.30 h

SPRACHRUNDE

Quiz

Thema: Geschichte von Esperanto und der Esperanto-Bewegung

LINGVA RONDO

Kvizo

Temo: Historio de Esperanto kaj de la Esperanto-movado

Anina Stecay

19.30



Tradukita literaturo el ses lingvoj

La arto de tradukado

Kial estas tiom malfacile bone traduki - kaj aliaj sekretoj de lingvoj.
Traktas temojn kiel miskomprenoj, malsamaj lingvaj konceptoj, la vasteco de plursignifeco kaj la koncepton de signifoareo. Mi montros multajn varilingvajn ekzemplojn, kaj el kiuj lingvoj estas kial eĉ pli malfacile ol en aliaj, traduki senperde. Finprelege eĉ solviĝas la demando de la demandoj: kiu lingvo estas objektivite la plej bona?

Ulrich Fellmann

donnerstag, den 16.4.2015

ĵaŭdon, la 16an de apr. 2015

18.30 h

babelstunden

babelaj horoj

Mitgliederversammlung

Wie angekündigt fand am 5. März 2015 die Mitgliederversammlung unserer Gesellschaft statt.

Wir hatten schon im letzten Jahr darüber diskutiert, dass wir unseren Vorstand verjüngen sollten. Das wurde auch nötig durch den Tod des Ehepaares Stoessel, die beide Mitglieder des Vorstandes waren und den Rücktritt der Vorsitzenden Katarina Eckstädt und des stellvertretenden Vorsitzenden Walter Ullmann. Um eine korrekte Wahl zu ermöglichen, sind auch die restlichen Mitglieder des Vorstandes zurückgetreten. So wurde der gesamte Vorstand für zwei Jahre neu gewählt. Damit haben wir einen neuen Vorstand, der trotz zweier älterer Mitglieder aus dem alten Vorstand (Ullmann, Eckstädt) jetzt größtenteils aus Mitgliedern zwischen 38 und 51 Jahren besteht. Das ist sicher sehr gut. Unsere Gesellschaft, wie auch viele andere in Deutschland, braucht jüngere aktive Mitglieder, die eine neue Brise in unsere Arbeit bringen.

So sind jetzt im Vorstand:

Martin Schmitt, 1. Vorsitzender,
Dr. Anina Stecay, Stellvertretende Vorsitzende,

Reinhard Pflüger, Kassenwart
Dr. Klaus Rumrich, Schriftführer

Und die Beisitzer:

Katarina Eckstädt,
Georg Hennemann.
Hildegard Stecay und
Walter Ullmann.

Auf der ersten Seite sind die Adresse, Telefonnummer und E-Mail-Adresse des neuen Vorsitzenden, Martin Schmitt. Wir bitten alle Mitglieder, sie sich zu notieren.



Wo sind denn nur die neuen Wege?

Membrokunveno

Kiel anoncite la 5an de marto 2015 okazis la membrokunveno de nia asocio. Ni diskutis jam lastan jaron, ke ni devus plijunigi nian estraron. Tio iĝis necesa ankaŭ pro la morto de la geedzparo Stoessel, kiuj ambaŭ estis estraranoj kaj la demisio de la ĝisnuna prezidantino Katarina Eckstädt kaj de la vicprezidanto Walter Ullmann. Por ebligi la senriproĉan elekton, demisiis ankaŭ la postrestintaj estraranoj. Tiamaniere ni elektis dum la ĉi-jara membrokunveno la tutan estraron por du jaroj. Tiel ni havas la novan estraron, kiu malgraŭ de du pli aĝaj estraranoj el la malnova estraro (Ullmann, Eckstädt) nun plejparte konsistas el membroj kiuj estas inter 38- kaj 51-jaraj. Tio estas certe tre bone. Nia asocio, kiel ankaŭ multaj aliaj asocioj en Germanio, bezonas pli junajn aktivajn anojn, kiuj portos freŝan brizon en nian laboron. En la nova estraro estas:

Martin Schmitt, 1. prezidanto,
D-rino Anina Stecay, vicprezidantino,
Reinhard Pflüger, kasisto
D-ro Klaus Rumrich, protokolanto

Aliaj estraranoj estas:

Katarina Eckstädt,
Georg Hennemann,
Hildegard Stecay kaj
Walter Ullmann.

Sur la unua paĝo troviĝas la adreso, telefonnumero kaj retpoŝta adreso de la nova prezidanto. Ni petas ĉiujn membrojn, notu ilin.



Martin Schmitt kaj Katarina Eckstädt

Raymond Schwarz (1894-1973)



Raymond Schwarz

Raymond Schwarz naskiĝis en franca familio la 8-an de aprilo 1894 en Metz, tiam apartenanta al Germanio. Li parolis francan kaj germanan lingvojn, lernis krome grekan kaj latinan. Dum la Unua Mondmilito li estas armiigita kaj devis batali sur la orienta fronto. Tio tre senluziigis lin, la revanton pri la tutmonda paco per Esperanto. Post la milito li transloĝiĝis al Parizo, kvankam nun Metz apartenis al Francio. Li estis bankoficisto kaj emeritiĝis kiel bankdirektoro de konata banko. Samtempe li, serioza bankoficisto, ludis en esperanta kabaredo (li gvidis tri kabaredojn: [Verda Kato \(1920 - 1926\)](#), [Bolanta kaldrono \(1936 - 1939\)](#), [Tri koboldoj \(1949 - 1956\)](#)). Por ili li kreis multajn skeĉojn. Krom skeĉoj li verkis la romanon „Kiel akvo de l' rivero“, unu el la plej bonaj romanoj en Esperanto kaj multajn humoro-

plenajn versaĵojn. Ili kelkfoje ne estas prudaj kiel tion montras la unua strofo de la poemo *Kun siaspeca spico*:

Jen estis fraŭlin' en Parizo;
ŝi dormis sen noktoĉemizo,
feliĉe ŝi havis
- Kaj tio min ravis -
piĝamon en mia valizo.

Pri li estas en *Enciklopedio de Esperanto* skribite: „Li publikigis rimaĵojn jam en 1912 (en „Tutmonda Espero“ kaj post la milito poemojn kaj artikolojn en diversaj gazetoj, precipe en *Literatura Mondo*. Ekde 1933 li redaktas la monatan spritgazeton, „*La Pirato*“). En Schwarz la Esperanta mondo trovis sian humoriston, kiu la tro verdajn flankojn de la movado scias mirinde eklumigi per sia buba spegulpeceto. En la *Pirato* li estas vere la „terura infano“ de la Esperanta familio: nenio restas kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgas, kiu aŭ kio estas inda je grimaco aŭ pinĉo. Sed pinĉante per moko, samtempe li tiklas per sprito, tiel ke la pinĉito mem devas ridi anstataŭ indigni - Liaj versaj verkoj „*Verdkata Testamento*“ (1926) kaj „*La Stranga Butiko*“ (1931) estas plenaj de la sukaj fruktoj de lia kurioza fantazio: kanzonoj laŭ kabareta stilo, ironia prezento de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, akre trafaj kaj milde pikaj observoj, spritaj vortludoj. Ĉio ĉi, prezentita per perfekta verstekniko, montras lin kiel simpatian bohemon, kiu havas tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de l' vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto, sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita.“

Li certe estis iu miriga – magiisto de la lingvo kaj ludanto kun la lingvo.

Li mortis la 14-an de majo 1973 en Parizo.

Prelego pri la fundamentaj Elementoj de Esperanto

Gesinjoroj! – Iun aŭ alian tagon ĉiu el vi fariĝos akademiano. Tiam ne estos senutile koni la plej kaŝitajn sekretojn de nia lingvo... Kaj tial ni decidis malkaŝi antaŭ vi tiujn mirindaĵojn. Bonvolu nin sekvi!

Kompreneble ni komencos per la komenco, t.e. per la alfabeto.

Gesinjoroj – la Esperanta alfabeto estas stranga fenomeno. La plej sagacaj sciencistoj ne scias ekzakte, al kiu fako la alfabeto apartenas.

Multaj kalkulas ĝin inter la legomoj. - Ili pretendas, ke ĝi estas el la familio de la betoj, kiel, cetere, ĝia nomo atestas: alfa beto. – Aŭ ili pedante ĝin subordigas al malgranda fabo, t.e. al fabeto.

Ni, kontraŭe, asertas, ke la alfabeto ne apartenas al la legomoj, sed al la homoj, kiuj legas. Ĝi apartenas al la... leg-homoj. Ĉu vi kaptis la nuancon?

Lastatempe oni renkontas ankaŭ modernajn filologojn, kiuj klasifikas la alfabeton inter la meblaro.

Laŭ ili, la alfabeto estas meblo, ĉar ĝi estas lito konsistanta el 28 lit-eroj.

Ĝi estas tuta meblaro, ĉar, efektive, per simpla kunmeto de diversaj literoj oni konstruas plej diversajn meblojn. Ekzemple:

k – m – d = komodo;

s – f = sofo, kaj tiel plu.

Tiu klasifiko ŝajnas akceptebla.

El la diritaj 28 literoj oni iom post iom kunmetis vortojn, formis frazojn, produktis librojn.

Estas preskaŭ nekredible, kiom da volumoj oni sukcesis plenigi per tiuj kelkaj literoj.

Se oni metus unu sur la alian, ĉiujn librojn ĝis nun verkitajn, oni havus turon miloble pli altan ol la Eiffel-turo kaj nur iom malpli altan ol la Babela. Kaj tiu turo, konsistanta el nur malmultaj literoj, fakte ekzistas. Oni nomas ĝin Litera Turo!

Elĉerpinte tiel ĝisfunde la sekretojn de l'alfabeto, ni nun parolos pri la proksima paragrafo: la artikolo.

Estas insulto klarigi al vi, kio estas artikolo.

Artikoloj troviĝas en ĉiuj gazetoj. La plej mallongaj ĝenerale estas la plej bonaj.

Tiurilate ankaŭ, ni rememorigu saĝan konsilon de nia Fundamento, kiu bedaŭrinde ne estas sufiĉe atentata:

„La personoj, por kiuj la fuŝado de artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la unua tempo tute ĝin ne fuŝi.“

(Fund. §1-a)

Kaj nun, gesinjoroj, antaŭ ol fini, ankoraŭ kelkajn vortojn pri la kazoj:

La kazoj estas la formoj de la deklinacio. Sed ne konkludu, ke „kazo“ estas sinonimo de „formo“. Neniam diru: „Tiu fraŭlino havas agrablajn kazojn.“ Ĉar, kiam vi interesiĝas pri la formoj de fraŭlino, tio koncernas ne la kazon, sed... la kason! – Ĉu vi kaptis la nuancon?

En Esperanto ekzistas nur du kazoj: nominativo kaj akuzativo. Erare kelkaj soifuloj aldonas la „aperitivon“* La aperitivo ne estas kazo, sed nur okazo, jes, okazo por trinki, kaj tiun ĉi okazon, gesinjoiroj, mi volonte profitos...

*Aperitivo = antaŭmanĝa trinkaĵo, laŭdire apetitiva, pri kies populareco en Francujo kaj en aliaj civilizitaj landoj la aŭtoro ne rajtas plendi.

(el „La ĝoja podio“, Paris, 1949)

oni kompletas

Patro. – Brrr! Kia vetero! Aŭskultu, edzino, ekstere hurlas la vento.

Patrino. – Jes, abomena vetero! Oni ne metus hundon antaŭ la pordon kaj tamen mi devis forsendi Zuzu.

Patro. – Zuzu? Nian filinon. Vi forsendis nian filinon?

Patrino. – Ne estis facile. Komence ŝi ne volis iri. Mi havas la impreson, ke ŝi suspektas ion. Mi forsendis ŝin al la buĉejo. Dum dek minutoj ni estas solaj kaj povos decidi...

Patro. – Jes. Estas bone, ke ŝi foriris. Voku la avon kaj diru ankaŭ al la onklino, ke Zuzu foriris.

Onklino. – Jen, mi jam venas. Mi vidis de la fenestro, ke Zuzu foriris. Ni povas nun trankvile decidi.

Patro. – Jes, sed tamen ni atentu. Ŝi povas reveni ĉiumomente, Eniru, avo, eniru! Kaj nun fermu la pordon, edzino, Vi estas tute certa, ke ŝi foriris? Fermu ankaŭ la ŝrankon, oni ne

povas esti sufiĉe singarda.

Avo. – Nu, kio estas?

Patro. – Zuzu foriris. Ŝi ne restos longe, ni devas rapidi.

Patrino. – Paroli pli laŭte, la avo ne aŭdas.

Patro. – Pli laŭte? Sed la muroj mem kelkfoje havas orelojn.

Patrino. – La avo ankaŭ kaj tamen li ne aŭdas!

Avo. – Nu, pri kio temas?

Onklino. – Zuzu foriris al la buĉejo.

Avo. – Malbona ideo iri al la muzeo dum tia vetero.

Ĉiuj. – Al la buĉejo... buĉ... buĉ!

Avo. – Je viaj sanoj! Sed vi ne bezonas terni tiel laŭte, mi ne estas surda.

Patro. – Feliĉe! Do ni decidu rapide.

Avo. – Pri kiu vi parolas?

Patrino. – Pri Zuzu, avo.

Avo. – Ha! jes, pri la zuavo, sed kiu zuavo?

Patro. – Bona Dio! Pri Zuzu, nia filino. Ni volas nun decidi. Restas nur kvar tagoj ĝis Kristnasko, nur kvar tagoj...

Avo. – Kvar tagoj? Kiom rapide la tempo pasas. Kiam mi estis juna, la tagoj ne tiel rapide pasis...

Patrino. – Konsentite, avo, sed ni ne perdu nian tempon. Zuzu povas reveni post unu momento. Se ŝi aŭdas nin, ĉio estos fuŝita. Ne plu estos surprizo. Ni kunvenis por decidi, kion ni aĉetu al ŝi kiel Kristnasko-donacon.

Patro. – Do ni proponas, la patrino kaj mi, ke ni aĉetu iun...

Avo. – Ne krii tiel laŭte, Zuzu povas aŭdi nin

Patro. – Sed ŝi ne estas en la domo!

Avo. – Kun kiu homo?

Patro kaj Onklino. – Zuzu iris al la buĉejo!

Avo. – Ha! bone! Kial vi ne diris tion tuj?

Patrino. – Kvietiĝu, avo, nun necesas rapidi por solvi la demandon.

Avo. – Jes, jes, ŝi alportos la viandon.

Patro. – Ho! Tamburo kaj trumpeto! Ni neniam finos, Restas nur kelkaj minutoj. Do ni opiniis, la patrino kaj mi, ke ni povus... Ĉu oni frapis la pordon?

Onklino. – Ne, estas la kato, kiu saltis sur la plankon...

Patro. – Do ni proponas aĉeti mansaketon el krokodilledo.

Patrino. – Kun diversaj tualetartikloj interne. Broseto, kombilo...

Avo. – Pro kio pumpilo?

Onklino. – Jes, saketo el krokodila ledo. Eble bona ideo, sed ĉu tio plaĉos al Zuzu? Ŝi havas tiel strangajn gustojn. Lastan jaron ni cerbumis dum tri tutaj tagoj kaj fine ni tamen ne sukcesis kontentigi ŝin.

Patrino. – Sed ĉi tiun fojon ni ne bezonas rompi niajn kapojn, ĉar mi sukcesis, per lertaj demandoj, ekscii, kio plaĉas al ŝi.

Onklino. – Kaj estas saketo el krokodilledo?

Avo. – Kial kotleto?

Patrino. – El krokodilledo, avo, jes, ŝi de longe avidas tian saketon. Mi kredas, ke ĝi ne estos tro multekosta, kaj Zuzu estos ravita, kiam ŝi trovos tiun donacon sub la Kristnask-arbo. Ĉu vi konsentas, onklino?

Onklino. – Tutkore, certe, kaj kio pleje plaĉas al mi en tiu ĉi afero estas, ke mi ne bezonos diskuti dum tri tagoj por trafi la ĝustan donacon.

Patrino. – Kaj vi, avo?

Avo. – Pri kiu temas?

Patro. – Ho! sankta funelo! Ni ne povas rekomenci! (*Frapoj ĉe la pordo.*) Aŭskultu! lu venas!

(Voĉo de Zuzu ekstere.)

Zuzu. – Kio okazas ĉi tie? Kial vi fermis la pordon? Ĉu oni komplotas?

Patrino. – Mi tuj malfermos, Zuzu! (Al la aliaj.) Kaj vi, bone gardu la sekreton!

Zuzu. (eniranta). – Mia citrono! Kiaj seriozaj mienoj? Sed kio okazas?

Avo. – Ha! estas vi, Zuzu. Ili diris al mi, ke vi estas en la preĝejo.

Zuzu. – Ne, avo, ne. En la buĉejo mi estis, sed mi ne bezonis tri horojn por aĉeti tri bifestekojn. Kaj vidu (ŝi malfermas pakaĵon), survoje mi eĉ havis tempon por iomete rigardi la magazenojn kaj mi rimarkis ĉi tiun saketon el krokodilledo, pri kiu mi revas jam de longe. Ĝi tiom plaĉis al mi, ke mi aĉetis ĝin tuj. Vidu, kiel praktika, kun diversaj tualetartikloj interne, broso, kombilo...

Ĉiuj. – Ha katastrofo!

Avo. – La komploto fiaskis!

(el „La ĝoja podio“, Paris, 1949)

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo,
La ĉarma an' de Epikur'
La Verdano Katon, ho terur!
Li pikis morta per ombrelo.


Kaj post la streĉ' de l' kata felo
Li testamentis per tambur'...

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo,
La ĉarma an' de Epikur'.

En verso, ŝerco kaj novelo
Grimaco kaj karikatur'
Ni ĉiam sentas kun plezur'
Aromon de la moskatelo.

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo!

Kálmán Kalocsay, Rimportretoj



R. Schwartz el la libro „La stranga butikiko“
Desegnaĵo de Raymond Laval

Paris, 1931

La diversaj aĝoj de l'homo

En supra ĉambro, lulo... lulo...
Anĝele dormas la etulo:
Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras
Kaj pri la bela mondo miras:
Miraĝo.

Jam ne plu side li tamburas,
Sed tra la dom' explore kuras:
Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)
Revenas el stratbubaj bandoj:
Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo
Knabinon ĉien sur la vojo:
Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon:
Por fondi kune novan domon:
Domaĝo.

Li tiam estas tre utila
Fortika viro, kvankam vila:
Vilaĝo.

Kaj post rapida tempopaso
Postrestas nur senviva maso:
Masaĝo.

P.S.

Ni ne apliku al Virino
Ĉi tiun viv- kaj rimo-saĝon,
Ĉar de l' komenco ĝis la fino
Ŝi ĉiam havas saman aĝon:
Avantaĝo.

(el „La stranga butikiko“, Paris, 1931)

Membrokunveno



Atendo

M. Ullmann, Gerd Schubert, Anina Stecay, Elisabeth Rabenstein

ĉiuj fotoj: uf

Dankon!



Franziska Reisel

Plej ofta vizitantino de niaj renkontiĝoj



Heinrich Rabenstein
(ĉi tie kun sia edzino Elisabeth)
estis tiom ofte ĉe niaj renkontiĝoj kiel
Franziska Reisel.
Dankon!



K. Eckstädt raportas pri la laboro
de la estraro

W. Ullmann kaj K. Eckstädt

